

### Duope pli bone brulas

La flamoj de lignoŝtipo estas nutrataj malpli de la lignotavolo proksima de la surfaco, sed de la eskapantaj brulemaj gasoj, kiuj estas liberigataj kiam loziĝas la molekuloj de la ligno. El tio sekvas, ke ligno nur brulas, kiam la surfacaj tavoloj tiomgrade varmiĝas, ke la gasproduktado estas certigita.

Unuopa lignoŝtipo ne liveras sufiĉe da varmo al sia interno, ĉar tiu forme de varmradiado (infraruĝa lumo), ardaĵ fulgeroj kaj la menciitaj gasoj foriĝas el la ligno.

Mankas do iu reen radiantata tavolo - kiu plej efike konsistas el najbara lignoŝtipo. La ŝtipoj do reciproke varmigas unu la alian, kaj ne necesas forkonsumiĝi unu post la alia sed unu ĉe la alia.

(2001-11-24/25)

### Ment-oleo kontraŭ moskitoj

Hindaj esploristoj propagandas mentan oleon kiel fortan armilon kontraŭ moskitoj portantaj malarion. Por ties larvoj la oleo estas mortiga, kaj kontraŭ la adultaj insektoj ĝi efikas forpele. Tion pruvis studo, daŭre de kiu la provatuloj, forte odorantaj pro menta oleo kaj eksponitaj al lumluno kaj al amaso da moskitoj, trapasis plurajn noktojn sen malbona sekvo.

Malgraŭ etkosteco kaj pretiga facileco la kontraŭ-moskita metodo tamen ne ŝajnas esti taŭga rimedo. Por detrui la moskitan idaron sole ĉirkaŭ unu vilaĝo estas necesaj pluraj tunoj da mentaj folioj. Kaj restas la demando, ĉu noktuloj bonvolas, post ment-olea banado, trapasi la tutan nokton kiel vivaj mentbonoj.

(2001-11-29)

### Ŝtata dialekto el Saksujo

Ekde la malfrua mezepoko la "skribita" germana lingvo estis sufiĉe unueca. Sed tiam oni alstrebis ankaŭ unuecon de la elparolado. Ĝis meze de la 18a jarcento kaj eĉ pli poste validis kiel altgermana lingvo la "mejsena dialekto" (laŭ *Meißen*, urbo en la orientgermana Saksujo). Sed iom post iom evidentiĝis, ke la saksoj havis grandajn problemojn pri la fonetika distingo inter d kaj t, inter g kaj k, inter b kaj p.

Aliflanke oni eltrovis, ke la basgermana lingvo de Malsupra Saksujo inter la urboj Brunsvigo kaj Hanovro en norda Germanujo plej bone plenumis la antaŭkondiĉojn, reprodukti kaj resonigi la germanan literaturan lingvon.

Estis la verkisto *Karl Philipp MORITZ* (1756-1793), kiu postule invitis la noblajn sinjorinojn en la ĉefurbo Berlino "paroli elegant-maniere, kaj elparole orientiĝi laŭ Brunsviganoj kaj Hanovranoj".

(2002-01-02)

### Kiom longe dormas marmoto?

Dumvintre la alpaĵ marmotoj dormadas "intervale". Por po 2 semajnoj ili malaltigas siajn korpotemperaturon al 3 gradoj de Celsio. Poste ili hejtas sin por daŭro de nur unu tago al 36°C. La fortan malvarmigon la bestetoj postvivas pro strikte plenumita nutradmaniero dumsomera.

Homogino alpa, trifolio alpa, taraksako (helveta!) kaj junaj kardufolietoj kun ties enhavo de plurfoje subsaturitaj grasacidoj estas ideala salato. Tiel la malvarmo estas sufiĉe bone venkebla kaj la marmotoj, tiel nutritaj, ne tiom ofte devas ekvekiĝi.

Tio estas energiŝpara, kaj la besteto povas fortoplene eniri sian sekvajaran generadan kaj fajfadon vivosezonon.

(2002-01-04)

### Pri saŭroj ĉiam io nova

La plej freŝdata prisauŭra sceneja aranĝo estas prezentita de usonaj mar-spertuloj: la jam ĉiufanke famkonata meteorito trafas antaŭ 65 milionoj da jaroj la Teron. Tiun ĉi fojon rekte en Meksikian golfon.

Dum la frapiĝo sur la marprofundon la meteorito ekfunkciigas fortajn ŝokondojn, kiuj siaflanke senkatenigas gigantajn amasojn da metano ĉirkaŭ nia planedo. Fulmobatoj ekbruligas la metanhavan atmosferon.

Lasta akto: incendio de apokalipsa amplekso rapidegas ĉirkaŭ la globon kaj rostaĵe ekstermas la tutan saŭropopulacion. Kurteno falas. Fino. Kaj kio subtenas tiun tezon? Malregulaĵoj de la sedimentoj el la kretaceo, observita en Florido, Usono.

(2001-11-26)